

Parto III

Ĝermanaj Lingvoj – Spræk

Spræk estas transskribo kaj por ponti inter la Praĝermana kaj la ĝermanaj lingvoj kaj por ponti inter la ĝermanaj lingvoj mem.

mus	mus		
angle	mūs	mouse	[maʊs]
nederlande	mūs	muis	[mœys]
germane	mūs	maus	[maʊs]
dane	mus	mus	[mu:ʔs]

Tabelo 89: *muso*

Kiam elementoj de iu praĝermana formo ŝanĝiĝis en ĉiuj modernaj ĝermanaj lingvoj, ĝi same ŝanĝiĝas en **Spræk**.

khauzijan	hørǎn		
angle	hør	hear	[hɪə]
nederlande	horǎn	horen	[ˈhɔ:rən]
germane	hørǎn	hören	[ˈhø:rən]
dane	hørǎ	høre	[ˈhø:rə]

Tabelo 90: *aŭdi*

Spræk ne distingas, ĉu la fontolingvo estis la Pra-Ĝermana aŭ la Pra-Okcidentĝermana. Neĝermanaj fontolingvoj estas reprezentataj en ties ortografio.

cūrǎ	kur		
angle	kȳr	cure	[kjʊə]
nederlande	kyr	kuur	[ky:r]
germane	kur	kur	[ku:ɐ]
dane	kur	kur	[ku:ʔr]

Tabelo 91: *kuracado*

5 Pra-Ĝermanaj Fonemoj

5.1 Finaĵoj

Praĝermanaj finaĵoj ofte ne konserviĝis en modernaj ĝermanaj lingvoj. Tiam ili same ne plu uziĝas en **Spræk**.

grundus	grund		
angle	grūnd	ground	[graʊnd]
nederlande	grūnd	grond	[ɣrɔnt]
germane	grund	grund	[grʊnt]
dane	grūnd	grund	[grɔnʔ]

Tabelo 92: *grundo*

Malofte, praĝermana finaĵo restas en **Spræk**, ĉar ĝi ne ekzistis en ĉiuj modernaj ĝermanaj lingvoj.

fader	fadēr		
angle	fadēr	father	[ˈfɑːðər]
nederlande	fadēr	vader	[ˈvɑdər]
germane	fadēr	vater	[ˈfaːtɐ]
dane	fadēr	far	[faːr]

Tabelo 93: *patro*

Praĝermana finaĵo povas mallongigi la radikan vokalon. La konsonanta fino de la radiko tiam skribiĝas duoble en **Spræk**.

sumera	summēr		
angle	sūmmēr	summer	[ˈsʌmər]
nederlande	sūmēr	zomer	[ˈzoːmər]
germane	sūmmer	sommer	[ˈzɔmɐ]
dane	sūmmer	sommer	[ˈsɔmɐ]

Tabelo 94: *somero*

5.2 Sufiksoj

La praĝermanaj sufiksoj *-ij-*, *-oj-* kaj *-j-* ne konserviĝis en modernaj ĝermanaj lingvoj, sed ofte kaŭzis palataliĝon de la radika vokalo (aŭ diftongo). Simile kiel finaĵo, praĝermana sufikso povas mallongigi la radikan vokalon. Praĝermana sufikso tamen ne mallongigas praĝermanan radikan *o*.

sokjan	søkǣn		
angle	søk	seek	[si:k]
nederlande	søkǣn	zoeken	[ˈzu:kən]
germane	søkǣn	suchen	[ˈzu:xŋ]
dane	søkǣ	søge	[ˈsøːjə]

Tabelo 95: *serĉi*

6 Vokaloj

Praĝermanaj vokaloj (monoftongoj kaj diftongoj) plej ofte ŝanĝiĝis en la modernĝermanaj lingvoj. Ili (mal-)palataliĝis, (mal-)fermiĝis kaj (mal-)diftongiĝis.

6.1 Palataliĝo

a → **æ**: Praĝermana *a* ofte palataliĝis al *æ*.

tamijan	tæmǎn		
angle	tæm	tame	[tɛɪm]
nederlande	tæmmǎn	temmen	[ˈtɛmən]
germane	tæmǎn	zähmen	[ˈtsɛ:mən]
dane	tæmmǎ	tæmme	[ˈtɛmə]

Tabelo 96: *malsovaĝigi*

o → **ø**: Praĝermana *o* ofte palataliĝis al *ø*.¹⁶

swotijaz	swøt		
angle	swøt	sweet	[swi:t]
nederlande	swǔt	zoet	[zu:t]
germane	swǔt	süß	[zy:s]
dane	swǔt	sød	[sø:ˀð]

Tabelo 97: *dolĉa*

u → **y**: Praĝermana *u* ofte palataliĝis al *y*.¹⁷

kussijan	kyssǎn		
angle	kyss	kiss	[kɪs]
nederlande	kyssǎn	kussen	[ˈkʉsən]
germane	kyssǎn	küssen	[ˈkʏsɪŋ]
dane	kʏssǎ	kysse	[ˈkʉsə]

Tabelo 98: *kisi*

¹⁶En la Angla, longaj *æ*, *ø* kaj *y* regule prononciĝas kiel longa *i* [i:]. Kontraste, oni distinge prononcas mallongajn *æ* [æ], *ø* [e] kaj *y* [ɪ].

¹⁷En la Nederlanda, kaj mallonga *ø* kaj mallonga *y* prononciĝas [ø], t. e. inter [ø] kaj [y]. (Mallonga *u* estas ĉiam palatala.)

6.2 Malpalataliĝo

æ → **a**: Praĝermana æ ofte malpalataliĝis al a.

sprækijo	spræk		
angle	spræĥ	speech	[spi:tʃ]
nederlande	sprak	spraak	[spra:k]
germane	sprakĕ	sprache	[ˈʃpra:xə]
dane	språk	sprog	[sbɾo:ˈw]

Tabelo 99: *lingvo, parolo*

e → **a**: En la Dana, la diftongo *ej* prononciĝas *aj*. Tio ne estas aparte markata en Spræk.

wegaz	weg		
angle	weg	way	[wei]
nederlande	wegg	weg	[ʋɛx]
germane	weg	weg	[vɛk]
dane	weg	vej	[vɛʀ]

Tabelo 100: *vojo*

6.3 Fermiĝo

e → i: Praĝermana e ofte fermiĝis al i.

thengan	teng		
angle	těng	thing	[spi:tʃ]
nederlande	těng	ding	[dɪŋ]
germane	těng	ding	[dɪŋ]
dane	teng	ting	[teŋʔ]

Tabelo 101: *afero, objekto*

a → o: Praĝermana a ofte fermiĝis al o en la Angla.

ana	an		
angle	ǎnn	on	[ɒn]
nederlande	an	aan	[a:n]
germane	ann	an	[an]
dane	ann	an	[an]

Tabelo 102: *ĉe, tuŝante la flankon de, sur*

Antaŭ *ll*, praĝermana a regule fermiĝis al o en la Angla. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **ǎll**, nure transskribiĝas **all** por la Angla.)

alnaz	all		
angle	all	all	[ɔ:l]
nederlande	all	al	[ɑl]
germane	all	all	[al]
dane	allě	alle	[ˈalə]

Tabelo 103: *ĉio, ĉiu*

o → u: Praĝermana o ofte fermiĝis al u.

bokiz	bok		
angle	bők	book	[bʊk]
nederlande	bők	boek	[bu:k]
germane	bők	buch	[bu:x]
dane	bok	bog	[bɔ:ʔw]

Tabelo 104: *libro*

æ → ø: Praĝermana æ ofte fermiĝas al ø en la Angla.

mæan	mæän		
angle	mǣ	moe	[məʊ]
nederlande	mǣän	maaien	['ma:iən]
germane	mæän	mähen	['mɛ:ən]
dane	–	–	[-]

Tabelo 105: *falci*

ø → y: Praĝermana ø ofte fermiĝis al y.

folijan	følän		
angle	fōl	feel	[fi:l]
nederlande	fōlän	voelen	['vʉ:lən]
germane	fōlän	föhlen	['fy:lən]
dane	fōlä	føle	['fø:lə]

Tabelo 106: *senti*

y → i: Praĝermana y ofte fermiĝis al i.

skeutan	skytän		
angle	skut	shoot	[ʃu:t]
nederlande	skýtän	schieten	['sxi:tən]
germane	skýtän	schießen	['ʃi:sŋ]
dane	skytä	skyde	['sgy:ðə]

Tabelo 107: *pafi*

6.4 Malfermiĝo

$u \rightarrow o$: Praĝermana u ofte malfermiĝis al o .

fullaz	full		
angle	full	full	[fʊl]
nederlande	fûll	vol	[vɔl]
germane	fûll	voll	[fɔl]
dane	full	fuld	[fulʔ]

Tabelo 108: *plena*

$y \rightarrow \emptyset$: Praĝermana y foje malfermiĝis al \emptyset .

dura-	dur		
angle	dûr	door	[dɔ:r]
nederlande	dÿr	deur	[dø:r]
germane	dÿr	tür	[ty:ɾ]
dane	dÿr	dør	[dœ:rʔ]

Tabelo 109: *pordo*

6.5 Diftongiĝo

Diftongiĝo estas markata kun streko ⁻.¹⁸

***i* → *ai*:** Praĝermana *i* ofte diftongiĝis al *ai*.

minaz	min		
angle	mīn	mine	[mɪn]
nederlande	mīn	mijn	[mɛɪn]
germane	mīn	mein	[mɛɪn]
dane	mīn	min	[miːn]

Tabelo 110: *mia*

En la Nederlanda, diftongiĝinta *i* prononciĝas palatala, kiel *ej*.

	bi	bi	
angle	bī	by	[bɪ]
nederlande	bī	bij	[bɛɪ]
germane	bī	bei	[bɛɪ]
dane	bi	bi	[bi]

Tabelo 111: *ĉe, apud*

***o* → *au*:** En la Germana, praĝermana *o* foje diftoniĝis al *au*, respektive, praĝermana *au* foje ne maldiftoniĝis al *o* en la Germana. Notindas, ke, en la Germana, diftongiĝinta *ō* [au] sonas same kiel diftongiĝinta *ū* [au].

baumoz	bom		
angle	bōm	boom	[bu:m]
nederlande	bom	boom	[bo:m]
germane	bōm	baum	[baum]
dane	bom	bom	[bomʔ]

Tabelo 112: *trunko, arbo, baro*

***u* → *au*:** Praĝermana *u* ofte diftongiĝis al *au*.

khusan	hus		
angle	hūs	house	[haus]
nederlande	hūs	huis	[hœys]
germane	hūs	haus	[haus]
dane	hus	hus	[hurːs]

Tabelo 113: *domo*

¹⁸Palataliĝo kaj diftongiĝo estas markebla kun dupunkto [˘]. Tial, anstataŭ *ǣ*, *ō̄*, *ȳ̄* transskribeblas *ǟ*, *ȫ*, *ǖ*. (Eblas redunde transskribi jam palatalajn vokalojn diftongiĝintajn kun dupunkto. Ekzemple, anstataŭ *ī̄* transskribeblas *ī̄*.)

$\text{æ} \rightarrow \text{ei}$: En la Angla, praĝermana palataliĝinta æ ofte diftongiĝas al ei .

khatojan	hætän		
angle	hæt	hate	[heit]
nederlande	hatän	haten	['ha:tən]
germane	hattän	hassen	['hasŋ]
dane	hată	hade	['ha:ðə]

Tabelo 114: *malami*

$\text{ø} \rightarrow \text{eu}$: En la Angla, praĝermana palataliĝinta ø ofte diftongiĝis al eu .

hupo-	hopän		
angle	høp	hope	[həʊp]
nederlande	hopän	hopen	['ho:pən]
germane	hoppän	hoffen	['hɔfŋ]
dane	hopă	håbe	['hɔ:bə]

Tabelo 115: *espero*

Notindas, ke, en la Germana, diftongiĝinta $\bar{\text{o}}$ [ɔy] sonas same kiel diftongiĝinta $\bar{\text{y}}$ [ɔy].

khaujan	hø		
angle	hō	hay	[hei]
nederlande	hō	hooi	[ho:i]
germane	hō	heu	[hɔy]
dane	hø	hø	[hø:ʔ]

Tabelo 116: *fojno*

$\text{y} \rightarrow \text{iu}$: En la Angla, praĝermana palataliĝinta y ofte diftongiĝis al iu .

newjaz	ny		
angle	nȳ	new	[nju:]
nederlande	nȳ	nieuw	[ni:w]
germane	nȳ	neu	[nɔi]
dane	ny	ny	[ny:ʔ]

Tabelo 117: *nova*

6.6 Maldiftongiĝo

ae → **æ**: Praĝermana *ae* ofte maldiftongiĝis al *æ*.

khaeran	hær		
angle	hǣr	hair	[he̯aɪ]
nederlande	har	haar	[ha:r]
germane	har	haar	[ha:e]
dane	hår	hår	[ho:ʔr]

Tabelo 118: *haro*

En la Nederlanda, praĝermana *ae* povas resti diftonga.

thraean	træǣn		
angle	trǣ	throw	[θrəʊ]
nederlande	trǣǣn	draaien	[ˈdra:iɛn]
germane	trǣǣn	drehen	[ˈdre:ɛn]
dane	trǣǣ	dreje	[ˈdrɛiɛ]

Tabelo 119: *turni, ĵeti*

ai → **æ**: Praĝermana *ai* kondukas simile kiel praĝermana *ae*, t. e. ĝi ofte maldiftongiĝis al *æ*.

stainaz	stæn		
angle	stǣn	stone	[stəʊn]
nederlande	stǣn	steen	[ste:n]
germane	stǣn	stein	[ʃtain]
dane	stǣn	sten	[sde:ʔn]

Tabelo 120: *ŝtono*

au → **o**: Praĝermana *au* ofte maldiftongiĝis al *o*.

brautham	brod		
angle	brōdd	bread	[bred]
nederlande	brod	brood	[bro:t]
germane	brod	brot	[bro:t]
dane	brød	brød	[brø:ʔð]

Tabelo 121: *pano*

aeu → **ø**: Praĝermana *aeu* ofte maldiftongiĝis al *ø*.

græwyaz	grø		
angle	grō	grey	[gɹeɪ]
nederlande	grō	grauw	[ɣɾaw]
germane	grō	grau	[grau]
dane	gro	grå	[grø:ʔ]

Tabelo 122: *griza*

ei → **i**: Praĝermana *ei* ofte maldiftongiĝis al *i*.

threjaz	tri		
angle	tri	three	[θri:]
nederlande	tri	drie	[dri:]
germane	trī	drei	[drai]
dane	trî	tre	[træ:ʔ]

Tabelo 123: *tri*

eu → **y**: Praĝermana *eu* ofte maldiftongiĝis al *y*.

beugan	bygǎn		
angle	būg	bow	[bau]
nederlande	būgǎn	buigen	[bœyγǎn]
germane	bȳgǎn	biegen	[bi:gn]
dane	bȳgǎ	bøje	[ˈbɔjə]

Tabelo 124: *fleksi*

ii → **i**: Praĝermana *ii* ofte maldiftongiĝis al *i*.

frijaz	fri		
angle	fri	free	[fri:]
nederlande	fri	vrij	[vri:]
germane	fri	frei	[frai]
dane	fri	fri	[fri:ʔ]

Tabelo 125: *libera*

iu → **y**: Praĝermana *iu* ofte maldiftongiĝis al *y*.

spiwan	spyǎn		
angle	spȳ	spew	[spju:]
nederlande	spūǎn	spuien	[spœyǎn]
germane	spȳǎn	speien	[ʃpaiǎn]
dane	spyǎ	spy	[sby:ʔ]

Tabelo 126: *kraĉi, sputi, vomĉi*

ou → **o**: Praĝermana *ou* ofte maldiftongiĝis al *o*.

bowwan	boǎn		
angle	–	–	[–]
nederlande	bōǎn	bouwen	[ˈbawən]
germane	bōǎn	bauen	[ˈbauən]
dane	boǎ	bo	[bo:ʔ]

Tabelo 127: *konstrui, loĝi*

ui → **y**: Praĝermana *ui* ofte maldiftongiĝis al *y*.

ruig	ryg		
angle	rȳg	rye	[rai]
nederlande	rûggĕ	rogge	[ˈrɔɣə]
germane	rûggĕn	roggen	[ˈrɔgŋ]
dane	ruĝ	rug	[ru:ʔ]

Tabelo 128: *sekalo*

uu → **u**: Praĝermana *uu* ofte maldiftongiĝis al *u*.

uwwalon	uĕl		
angle	ūĕl	owl	[aʊl]
nederlande	ūĕl	uil	[œɣl]
germane	ȳĕlē	eule	[ˈɔɣlə]
dane	uĕlē	ugle	[u:lə]

Tabelo 129: *strigo*

7 Konsonantoj

z → **r**: Praĝermana *z* regule fariĝis *r*.

auzon	or		
angle	ør	ear	[ɛər]
nederlande	or	oor	[o:r]
germane	or	ohr	[o:ɐ]
dane	ørē	øre	[ø:rø]

Tabelo 130: *orelo*

ĥ → **h**: Praĝermana *kh* komence de radiko regule fariĝis *h*.

khaima-	hæm		
angle	hǣm	home	[həʊm]
nederlande	hǣm	heem	[he:m]
germane	hæm	heim	[haim]
dane	hǣm	hjem	[jɛm]

Tabelo 131: *hejmo*

7.1 Voĉiĝo

En la Dana, senvoĉa konsonanto fine de radiko prononciĝas voĉe. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **bittĕr** transskribiĝas nure **bittĕr** por la Dana.)

bitra-	bittĕr		
angle	bittĕr	bitter	[ˈbɪtər]
nederlande	bittĕr	bitter	[ˈbɪtər]
germane	bittĕr	bitter	[ˈbɪtɐ]
dane	bittĕr	bitter	[ˈbedəɾ]

Tabelo 132: *amara*

En la Dana, la dua el du sinsekvaj senvoĉaj konsonantoj komence de radiko prononciĝas voĉe. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **stää** transskribiĝas nure **stää** por la Dana.)

sta(nda)-	staän		
angle	stænd	stand	[stænd]
nederlande	staän	staan	[sta:n]
germane	stæän	stehen	[ˈʃte:ən]
dane	stää	stå	[sdø:ʔ]

Tabelo 133: *stari, stando*

f → **v**: En la Nederlanda, praĝermana *f* komence de vorto prononciĝas duonvoĉe *v*. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**.¹⁹ (Tial, anstataŭ **fallän** transskribiĝas nure **fallän** por la Nederlanda.)

fallan	fallän		
angle	fall	fall	[fɔ:l]
nederlande	fallän	vallen	[ˈvɑləŋ]
germane	fallän	fallen	[ˈfalən]
dane	fallä	falde	[ˈfalə]

Tabelo 134: *fali*

s → **z**: En la Nederlanda kaj la Germana, praĝermana *s* antaŭ vokalo prononciĝas voĉe *z*. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **sæ** transskribiĝas nure **sæ** por la Nederlanda kaj la Germana.)

saiwaz	sæ		
angle	sæ	sea	[si:]
nederlande	sæ	zee	[ze:]
germane	sæ	see	[ze:]
dane	sæ	sø	[sø:ʔ]

Tabelo 135: *maro, lago*

¹⁹La Nederlanda prononco de *v* estas [v], t. e. inter voĉa [v] kaj senvoĉa [f].

7.2 Malvoĉiĝo

En la Nederlanda kaj la Germana, voĉa konsonanto fine de vorto prononciĝas senvoĉe. (Kun aldona vokalo de sufikso aŭ finaĵo, la voĉeco reaperas.) Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **mild** transskribiĝas nure **mild̥** por la Nederlanda kaj la Germana.)

milthjaz	mild̥		
angle	mīld	mild	[maɪld]
nederlande	mild̥	mild	[mɪlt]
germane	mild̥	mild	[mɪlt]
dane	mild̥	mild	[milʔ]

Tabelo 136: *milda*

d → **t**: Praĝermana *d* regule malvoĉiĝas al *t* en la Germana. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **dad** transskribiĝas nure **dad̥** por la Germana.)

dædis	dæd̥		
angle	dæd	deed	[di:d]
nederlande	dad	daad	[da:t]
germane	dad	tat	[ta:t]
dane	dād	dād	[dɔ:ʔ]

Tabelo 137: *ago*

g → **k**: En la Germana, voĉa konsonanta fino de radiko (krom *b*) regule fariĝas senvoĉa. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **æggē** transskribiĝas nure **æggē̥** por la Germana.)

agjo	æggē̥		
angle	æĝĝē	edge	[ɛdʒ]
nederlande	æggē̥	egge	[ˈɛgə]
germane	æggē̥	ecke	[ɛkə]
dane	æg	æg	[ɛ:ʔg]

Tabelo 138: *eĝo*

7.3 Frikativiĝo:

p → **f**: En la Germana, praĝermana *p* regule frikativiĝis al *pf*, foje post vokalo eĉ al *f*. Konserviginta *p* estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **appĉel** transskribiĝas **aĉĉel** por la Germana.)

aplaz	appĉel		
angle	aĉĉel	apple	[ˈæpl]
nederlande	appĉel	appel	[ˈɑpəl]
germane	aĉĉel	apfel	[ˈapfl]
dane	aĉĉelĉ	æble	[ˈɛːblə]

Tabelo 139: *pomo*

b → **v**: En la Angla, la Nederlanda kaj la Dana, praĝermana *b* post vokalo regule frikativiĝis al *v*. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **ĝebĉan** transskribiĝas nure **ĝebĉan** por la Nederlanda.) En la Angla, la radika vokalo tiam ofte mallongiĝis.

geban	ĝebĉan		
angle	ĝebb	give	[gɪv]
nederlande	ĝebĉan	geven	[ˈʝeːvən]
germane	ĝebĉan	geben	[ˈgeːbən]
dane	ĝebĉ	give	[ˈgiːvə]

Tabelo 140: *doni*

$t \rightarrow s$: En la Germana, praĝermana t regule frikativigis aŭ al ts , post vokalo foje eĉ al s . Konserviginta t estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **kattĕ** transskribiĝas **kättĕ** por la Germana.)

kattuz	katt		
angle	kætt	cat	[kæt]
nederlande	katt	kat	[kat]
germane	kättĕ	katze	['katsə]
dane	katt	kad	[kad]

Tabelo 141: *katino*

$s \rightarrow \hat{s}$: En la Germana, praĝermana s (pli-)frikativigis komence de radiko antaŭ konsonanto al \hat{s} . Tio ne estas aparte markata en **Spræk**; antaŭ p kaj t tio eĉ ne ortografiĝas en la Germana. (Tial, anstataŭ **ŝmal** transskribiĝas nure **smal** por la Germana.)

smalaz	smal		
angle	small	small	[smɔ:l]
nederlande	small	smal	[smal]
germane	smal	schmal	[ʃma:l]
dane	small	smal	['smalʔ]

Tabelo 142: *malvasta, malgranda*

k → **k̂**: En la Germana, praĝermana *k* regule frikativigiĝis post vokalo al **k̂**. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **breĉkĉän** nure transskribiĝas **breĉkĉän** por la Germana.)

brekan	brekän		
angle	br̄ek	break	[breɪk]
nederlande	br̄ekän	breken	['bre:kən]
germane	breĉkĉän	brechen	['breçɐŋ]
dane	breĉkĉä	brække	['brægə]

Tabelo 143: *rompi*

En la Angla, praĝermana *k* foje frikativigiĝis al **k̂**. Tio estas aparte markata en **Spræk**.

kirika	kirk		
angle	Ĵirk	church	[tʃɜ:tʃ]
nederlande	Ĵirk	kerk	[kɛrk]
germane	kirkĉ	kirche	['kɪrçə]
dane	kirkĉ	kirke	['kɪrgə]

Tabelo 144: *preĝejo, eklezio*

g → **ĝ**: En la Angla, praĝermana *g* foje frikativigiĝis al **ĝ**. La radiko vokalo tiam mallongiĝas.

brugjo	brygg		
angle	bryĝĝ	bridge	[brɪdʒ]
nederlande	brygg	brug	[brøx]
germane	bryggĉ	brücke	['brʏkə]
dane	brūĝ	bro	[bro:ʔ]

Tabelo 145: *ponto*

En la Nederlanda, praĝermana *g* regule frikativigiĝis al **ĝ**. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **ĝlass** transskribiĝas **glass** por la Nederlanda.)

glasam	glas		
angle	ĝlas	glass	[glɑ:s]
nederlande	glass	glas	[ɣlas]
germane	glas	glas	[glɑ:s]
dane	glass	glas	[glas]

Tabelo 146: *glaso, vitro*

7.4 Malfrikativiĝo:

t → **t**: En la Dana, praĝermana **t** malfrikativiĝis komence de radiko al *t*. En la Nederlanda kaj la Germana ĝi aldone voĉiĝis al *d*. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**.

	thakan	tak		
	angle	tækk	thatch	[θætʃ]
	nederlande	takk	dak	[dɑk]
	germane	takk	dach	[dax]
	dane	tak	tag	[ta:ʔ]

Tabelo 147: *tegmento*

Ĉe pronomoj, praĝermana **t** voĉiĝis en la Angla, la Nederlanda, la Germana kaj la Dana.

	thær	dær		
	angle	dær	there	[ðeər]
	nederlande	ðar	daar	[da:r]
	germane	ðar	dar	[da:ɐ]
	dane	dær	der	[de:ʔ]

Tabelo 148: *tie*

Post vokalo, praĝermana **t** kondutas kiel *d*.

	rauthaz	rod		
	angle	rødd	red	[red]
	nederlande	rod	rood	[ro:t]
	germane	rod	rot	[ro:t]
	dane	rød	rød	[rø:ʔ]

Tabelo 149: *ruĝa*

h → **k**: Praĝermana *kh* regule malfrikativiĝis al *k* antaŭ *s* en la Angla, la Germana kaj la Dana, dum en la Nederlanda, praĝermana *kh* eliziĝis antaŭ *s*. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **ks** respektive **s** transskribiĝas **h̄s**.)

	wakhsan	wahs		
	angle	wæhs	wax	[wæks]
	nederlande	wahs	was	[vas]
	germane	wahs	wachs	[vaks]
	dane	wăhs	voks	[vɔgs]

Tabelo 150: *vakso*

7.5 Duonvokaliĝo

b → ĥ → w: En la Dana, de praĝermana *b* frikativiginta *v* aŭ de praĝermana *f* voĉiginta *v* regule duonvokaliĝis al *w* post vokalo. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **rabĥen** transskribiĝas nure **rabĥen** por la Dana.²⁰)

kh h rab h anaz	ĥrabĥen		
angle	r æ bĥen	raven	[reiv ə n]
nederlande	rab	raaf	[ra:f]
germane	rab ē	rabe	[ra:b ə]
dane	rab ĥ en	ravn	[r ɑ w ˈ n]

Tabelo 151: *korvo*

d → d̄ → đ: En la Dana, praĝermana *d* (post frikativigi al *d̄*) duonvokaliĝis al *đ* post vokalo. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **lædđa** transskribiĝas nure **lædđa** por la Dana.²¹)

laith h jan	l æ d đ an		
angle	l æ d	lead	[li:d]
nederlande	l æ d đ an	leiden	[ˈ leid ə n]
germane	l æ d đ an	leiten	[ˈ leit ŋ]
dane	l æ d đ a	lede	[ˈ le:ð ə]

Tabelo 152: *konduki, gvidi*

Post konsonanto, praĝermana *d* eliziigis en la Dana. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **ændĥe** transskribiĝas nure **ænde** por la Dana.)

and h ja	æ nd		
angle	æ nd	end	[end]
nederlande	æ nd ĥe	einde	[ˈ ei nd ə]
germane	æ nd ĥe	ende	[ˈ end ə]
dane	æ nd ĥe	ende	[ˈ en ə]

Tabelo 153: *fino*

t → d → d̄ → đ: En la Dana, tiu frikativigo okazis same al praĝermana *t* post *longa* vokalo. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **hæt̄** transskribiĝas nure **hæt̄** por la Dana.)

kh h aita	h æ t		
angle	h æt	hot	[hot]
nederlande	h æ t̄	heet	[he:t]
germane	h æ t̄	heiß	[hais]
dane	h æ t̄	hed	[he:ð̄]

Tabelo 154: *varmega*

²⁰La labialiga ringo ˠ aplikata al labialo signifas (*mal-*)*duonvokaliĝon*. Duonvokaliĝo okazas nature nur post frikativigo. Tial, markante plozivon duonvokaliĝinta, la frikativiga ĉapelo ˠ estas superflua, kaj tial anstataŭ **ĥ** transskribiĝas nure **ĥ**.

²¹La dentaliga tilde ̄ aplikata al dentalo signifas (*mal-*)*duonvokaliĝon*. Duonvokaliĝo okazas nature nur post frikativigo. Tial, markante plozivon duonvokaliĝinta, la frikativiga ĉapelo ̄ estas superflua, kaj tial anstataŭ **d̄** transskribiĝas nure **d̄**.

$g \rightarrow \hat{g} \rightarrow j$: En la Angla kaj la Dana, praĝermana g post palatala vokalo (t. e. post æ , e , i , ø , y) regule frikativigis kaj duonvokaliĝis al j . Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ \hat{g} nure transskribiĝas g .²²)

dagaz	dag		
angle	dæg	day	[deɪ]
nederlande	dag	dag	[dɑx]
germane	dag	tag	[ta:k]
dane	daĝ	dag	[da:ʔ]

Tabelo 155: *tago*

Notindas, ke, en la Dana, la ŝanĝiĝo de praĝermana g povas varii de elizio, labiala duonvokalo, ...

dagaz + likam	daglik		
angle	dæglik	daily	[ˈdeɪli]
nederlande	dagēliks	dagelijks	[da:ʝələks]
germane	däglich	täglich	[ˈtɛ:kliç]
dane	daĝliĥ	daglig	[ˈdawlɪ]

Tabelo 156: (*ĉiu-*)*tage*

... labiala frikativo kaj velara duonvokalo en la Dana.

lægaz	læg		
angle	lōkk	low	[ləʊ]
nederlande	lag	laag	[la:x]
germane	lægĕ	läge	[ˈlɛ:gə]
dane	laĝ	lav	[lɛ:ʋ]

Tabelo 157: *malsupra*

$\hat{h} \rightarrow \hat{g} \rightarrow j$: En la Angla, praĝermana kh post vokalo foje voĉiĝis kaj duonvokaliĝis al j .

nakht	naht		
angle	naht	night	[naɪt]
nederlande	naht	nacht	[nɑxt]
germane	naht	nacht	[naxt]
dane	naht	nat	[nad]

Tabelo 158: *nokto*

²²Duonvokaliĝo okazas nature nur post frikativigo. Tial, markante plozivon duonvokaliĝinta, la frikativiga ĉapelo \hat{g} estas superflua, kaj tial anstataŭ \hat{g} transskribebblas nure g .

7.6 Malduonvokaliĝo

w → **v**: La nederlanda prononco de praĝermana *w* regule estas [v], t. e. inter duonvokala [w] kaj frikativa [v]. En la Germana kaj la Dana, praĝermana *w* malduonvokaliĝis al la frikativa *v*. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ **w** transskribiĝas **w** en la Germana kaj la Dana.)

	wisaz	wis		
angle	wīs	wise	[waɪz]	
nederlande	wīsē	wijze	[ˈvɛɪzə]	
germane	wīsē	weise	[ˈvaizə]	
dane	wis	vis	[viːs]	

Tabelo 159: *saĝa, maniero*

Post vokalo, praĝermana *w* foje malduonvokaliĝis al la frikativa *v*. Tio estas aparte markata en **Spræk** por la Angla.

	aiwo	æw		
angle	æwēr	ever	[ˈevə]	
nederlande	æwīg	eeuwig	[ˈeːwəx]	
germane	æwīg	ewig	[ˈeːvɪç]	
dane	æwīg	evig	[ˈeːvi]	

Tabelo 160: *ĉiam*

7.7 Labialiĝo

$g \rightarrow \hat{g} \rightarrow v$: En la Dana, frikativiginta \hat{g} foje labialiĝis al v . Tio estas aparte markata en **Spræk**.²³

fleugan	flygǎn		
angle	flýg	fly	[flaɪ]
nederlande	flýgǎn	vliegen	[ˈvliːɣən]
germane	flýgǎn	fliegen	[ˈfliːɡn̩]
dane	flygǎ	flyve	[flɪːvə]

Tabelo 161: *flugi*

$g \rightarrow \hat{g} \rightarrow v \rightarrow w$: En la Angla kaj la Dana, praĝermana g post malpalatala vokalo regule frikativigis al \hat{g} , labialiĝis al v kaj duonvokaliĝis al w . (Tia w asimiliĝis al antaŭa u aŭ u .) Tio ne estas aparte markata en **Spræk**. (Tial, anstataŭ \hat{g} transskribeblas nure \hat{g} .²⁴)

fuglaz	fugĝl		
angle	fūgĝl	fowl	[faʊl]
nederlande	fūgĝl	vogel	[ˈvoːɣəl]
germane	fūgĝl	vogel	[foːg]
dane	fugĝl	fugl	[fuːʔ]

Tabelo 162: *birdo*

En la Angla, g povas fariĝi w ankaŭ post konsonanto. Tiam maleliziiĝas ĉ inter la konsonanto kaj w .

fulgan	fulgǎn		
angle	fūllĝ	follow	[ˈfɒləʊ]
nederlande	fūlgǎn	volgen	[ˈvɔːɣən]
germane	fūlgǎn	folgen	[ˈfɔlgən]
dane	fýlgǎ	følge	[ˈføljə]

Tabelo 163: *sekti*

$k \rightarrow g \rightarrow \hat{g} \rightarrow v \rightarrow w$: En la Dana, tiu labialiĝo okazis same al praĝermana k post *longa* vokalo. Tio ne estas aparte markata en **Spræk**.

bokiz	bok		
angle	bōkk	book	[bʊk]
nederlande	bōk	boek	[buːk]
germane	bōk	buch	[buːx]
dane	bok	bog	[bɔːʔw]

Tabelo 164: *libro*

²³Labialiĝo okazas nature nur post frikativigo. Tial, markante plozivon labialiĝinta, la frikativiga ĉapelo \hat{g} estas superflua, kaj tial anstataŭ \hat{g} transskribiĝas nure \hat{g} .

²⁴Anstataŭ dupunkto " elblas transskribi du ringojn " – unu por labialiĝo, unu por duonvokaliĝo – aŭ unu punkton kaj unu ringon " – unu por (velara) duonvokaliĝo, unu por labialiĝo.

Kiam la evoluo de duonvokaliĝinta *g* devias de la ĉi-supre priskribitaj reguloj, necesas aparte marki ĝin. Se, ekzemple *g* post malpalatala vokalo fariĝas *j* en la Dana, tio estas aparte markata en **Spræk**.

sako	sak		
angle	sæk	sake	[sɛk]
nederlande	sak	zaak	[za:k]
germane	sakkĉ	sache	['zaxə]
dane	sak	sag	[sa:j]

Tabelo 165: *afero*

h → **f**: En la Angla, praĝermana *kh* post vokalo foje labialiĝis al la frikativo *f*.

tankhuz	taĥ		
angle	tāĥ	tough	[tʌf]
nederlande	tæĥ	taai	[ta:i]
germane	tæĥ	zäh	[tsɛ:]
dane	taĥ	sej	[sarʔ]

Tabelo 166: *persista*

hw → **f**: En la Angla, praĝermana *kh* inter vokalo kaj *w* foje same labialiĝis al la frikativo *f*. En la Nederlanda, ĝi povas eliziĝi, lasante la praĝermanan *w*. En la Germana kaj la Dana, ĝi regule eliziĝas kune kun la *w*.

rukhwaz	ruĥw		
angle	rūĥw	rough	[rʌf]
nederlande	ryĥw	ruw	[ry:w]
germane	rūĥw	rau	[rau]
dane	ruĥw	ru	[ru:ʔ]

Tabelo 167: *malmilda*

7.8 Mallabialiĝo

w → **j**: Post vokalo, praĝermana *w* foje mallabialiĝis²⁵ kaj malvoĉiĝis al [ç], t. e. palatala *ĥ*. Tio estas aparte markata en **Spræk**.

iuwiz	yw		
angle	ȳw	you	[ju:]
nederlande	yw	uw	[y:w]
germane	ȳw	euch	[ɔyç]
dane	ȳw	I	[i]

Tabelo 168: *vi, via, vin (plurale)*

²⁵t. e. *velariĝis*. Notindas, ke la duonvokaliĝo de la (voĉa) velara frikativo [x] al [j] same nomeblas *palataliĝo*, respektive ke la palataliĝo de la (senvoĉa) velara frikativo [x] al [ç] same nomeblas *duonvokaliĝo*.

7.9 Elizio

w: Kiam praĝermana w eliziĝis en ĉiuj modernaj ĝermanaj lingvoj, ĝi ne skribiĝas en **Spræk**.

manwaz	mann		
angle	mænn	man	[mæn]
nederlande	mann	man	[mɑn]
germane	mann	mann	[man]
dane	mann	mand	[manʔ]

Tabelo 169: *viro, homo*

Kontraste, kiam praĝermana w restis en almenaŭ unu moderna ĝermana lingvo, ĝi skribiĝas en **Spræk**.

snaiwaz	snæw		
angle	snæw	snow	[snəʊ]
nederlande	snæw	sneeuw	[sne:w]
germane	snæw	schnee	[ʃne:]
dane	snæw	sne	[sne:ʔ]

Tabelo 170: *viro, homo*